

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

10-a jarkolekto

N-ro 3, 1980

Edistudio, Pizo, Italujo

ENHAVO

<i>Kelkaj rimarkoj de la redaktoro pri tiu ĉi IPR-numero</i>	49
<i>Inaŭguro kaj kelkaj rezultoj de la 14-a konferenco en Malto:</i>	
<i>Mesaĝo de la ŝtatprezidento al la konferenco</i>	51
<i>Salutletero de la Ĉina Esperanto-Ligo</i>	51
<i>Saluto de Tejo</i>	52
<i>Salutvortoj al la konferenco kaj gastoj (prezidanto)</i>	52
<i>Edukado-ĝiaj tendencoj kaj la intencoj de ILEI — festparolado —</i>	54
<i>Parolado de lia ekscelenco la ĉefjuĝisto profesoro J.J. Cremona okaze de la malfermo de la 14-a konferenco</i>	58
<i>Rezolucio de la 14-a konferenco</i>	59
<i>Letero al s-ro Bow, Ĝenerala Direktoro de UNESKO</i>	60
<i>Grava propono de la 4-a studgrupo de 14-a ILEI-konferenco en Malto.</i>	61
<i>Metodika kaj didaktika servo de ILEI</i>	61
<i>Al la Eŭropa parlamento: Memorando de ILEI pri la lingvo Esperanto — ekzemplo por similaj agadoj en la mondo</i>	64
<i>Kiel niaj sekcioj laboras:</i>	
<i>Franca sekcio</i>	66
<i>Belga sekcio — Labordokumento por la estraranoj de F.E.L.</i>	67
<i>Niaj legantoj opinias, raportas</i>	69

Kelkaj rimarkoj de la redaktoro pri tiu ĉi IPR-numero.

Estas okazinta la 14-a konferenco de ILEI en Cottonera/Malto de la 24.7. ĝis 1.8.1980. Distance ĝi estis ĝis nun la plej malproksima, aŭgurante estonte forajn konferencojn de ILEI — forajn en la okuloj de la Eŭropanoj. Sed “Internacia Ligo” ne nur povas signifi “Eŭropo-Ligo”. Diris d-ro Zamenhof: Por ke lingvo fariĝu mondlingva ne sufiĉas nomi ĝin tia.

Konsilinde estus ke la mondaj Esperanto-organizaĵoj en komuna interkonsento decidu pri la mondaj manifestacioj. UEA kongresos 1981 en Brazilo kaj tial ILEI restos tiujare en Eŭropo kaj laŭdezire de la 14-a konferenco ĝi estas kunvenonta en Hungario.

Brila ebleco por niaj gekolegoj el socialismaj landoj, kiuj je certeco ne povos partopreni en Brazilo!

ILEI prave agis, elektante ĉi-jare sian konferencan lokon en Malto kiel la leganto sur la sekvantaj paĝoj povos facile konstati. Nia tiea ILEI-sekcio praktikadis niajn celojn: demonstri la internacian valoron de nia lingvo: sindone, ofereme, lerte kaj vere amikece. Mi nur bedaŭras, ke multaj sekcioj neglektas niajn manifestaciojn: Esperanto plene ruiniĝos kiam la sekcioj naciĝos!

La estraro de ILEI kaj vizitintoj de la 14-a konferenco en Malto alstrebas kunveni en 1982/83 (t.e. dum kristnaska/novjara tempo) en Aŭstralio dononte la ŝancon al niaj gekolegoj el la pacifika zono senpere kontribui nian laboron.

Iom pli da atento mi rekomendas al nia konferenca rezolucio, kiu kiel kutime iros diverslingve tradukita al ĉiuj penseblaj instancoj en la mondo: ni instruistoj — uzantaj la Internacian Lingvon kaj ligitaj en ILEI — konstante kaj borante tuŝu la verajn problemojn en edukado kaj lernado, proponu ĉiam konkretajn novajn vojojn kaj estu pretaj kunlabori. Tial ankaŭ la letero al S-ro Bow — la Ĝenerala Sekretario de UNESKO. Pri la “Nova Skribo” nia kolego Mirko Marcetta, verkos artikolon aperonta en IPR n-ro 1/1981.

Alia grava manifestacio de nia volo estas nia memorando direktita al la Eŭropa Parlamento (por ekstereŭropaj legantoj: la grandstila multekostaprovo kaj eksperimento surbaze de ses lingvoj unuigi malgrandan parton de Eŭropo). Ĉiuj 410 membroj de la parlamento ricevas nun esperantlingve kaj nacilingve la memorandon kaj aldonita letero petas respondon. Mia ideo estas, ke vi konsideru la eblecon apliki ĝin en via regiono — kompreneble en modifita formo.

Ĉiu IPR — mi esperas — posedas sian propran valoron, tamen menciindaj estas tri kontribuajoj:

Unu donos impreson pri la laboro de 4-a studgrupo de la 14-a konferenco en Malto. Geinstruistoj, laŭnome listigitaj en la raporto, jam estas la kerno de nova laborgrupo. Kontaktinda kaj kontaktebla kolegino estas: s-ino Pia Rolando-Incoronato, Via Panoramica 63, I-800 56 Ercolano. Speciala artikolo aperos en la venonta numero de IPR.

Alia rimarkinda raporto estis sendita el Francujo/Grésillon. La franca sekcio efektivas mirindan instruan laboron — nepre subtenenda!

La belga sekcio kompilis modelan laborplanon el kiu estas elektitaj kelkaj ekzemploj. Kiu deziras la tuton, bonvolu sin turni al la sekcio.

Plue la redaktoro informas, ke pro limigita loko en IPR respondaj artikoloj kaj opinioj pri la supersigno aperos en la venonta numero.

La prezidanto de ILEI aldonas: Nia mondvasta agado konsumas niajn kotizojn kvankam la estraro multe mem financigas siajn kunsidojn. Do, ni ne akumulmas la monon. Nia ĉefa financa fonto estas nia IPR — ĝi kostas 22 svedajn kronojn jare kaj inkluzivas ĉiujn membrajn kotizojn. Ni nombras proksimume 1 500 membrojn: la abonlisto por 1980 informas vin pri nia financa stato. Estas granda plezuro esti prezidanto de tia komprenema ligo.

Tamen!

Membroabonantoj de IPR 1980- stato Julio 1980

Argentino 1, Aŭstralio 4, Aŭstrujo 17, Belgujo 2, Brazilo 11, Britujo —, Bulgardo 5, Danlando 1, Finnlando 31, Francujo 28, Germanujo 23, Grekujo 0, Hispanujo 8, Hungarujo 0, Islando 0, Israelo 1, Italujo 170, Japanujo 0, Jugoslavio 0, Kolombio 0, Kubo 0, Luksemburgo 0, Malagasujo 0, Nederlando 69, Norvegujo 9, Malto 5, Nov-Zelando 0, Pollando 31, San Marino 5, Sovet Unio 0, Sud-Afriko 12, Svedujo 30, Svislando 16, Usono 56, Venezuelo 0, t.e. 535-ekzempleroj! Konsideru la paper — kaj preskostojn!

Inaŭguro kaj kelkaj rezultoj de la 14-a konferenco en Malto:

Mesaĝo de la ŝtatprezidento al la konferenco

**Ĉe la Kavalira Palaco,
Valletta, Malta
Nov. 1979.**

Estimata s-ro Vella-Bondin,

La Prezidento proponis ke mi, je lia nomo, danku vin kaj la organizan komitaton pro la ĝentila invito al Lia Ekscelenca Moŝto fariĝi Protektanto de la Internacia Kongreso okazonta en Malto venontan jaron.

Mi plezure komunias al vi, ke la Prezidento ĝoje akceptis protekti ĉi tiun Kongreson kaj ĉeesti la oficialan inaŭguron.

Kelkajn tagojn antaŭ la Kongreso, mi sendos al vi kopion de la porokaza prelego de la Prezidento, por ke oni ĝin traduku en Esperanton, ĝin disdononta al la delegitaro, ĉiam laŭ via deziro.

La Prezidento salutas vin kaj deziras sukceson.

**Estimata via,
(subskribita: S.L. Demarco)
Sekretario de la Prezidento.**

Salutletero de la Ĉina Esperanto-Ligo.

Al la 14-a Internacia Konferenco de I.L.E.I.

Estimataj samideanoj,

Antaŭ ĉio bonvolu akcepti nian elkoran kaj varman gratulon okaze de la 14-a Internacia Konferenco de I.L.E.I.

Kvankam ni ne povas persone partopreni en via konferenco, tamen ni alte taksas ĝin. Vi kunvenas en Malto, por refoje montri al la mondo, per faktoj nerefuteblaj, ke Esperanto estas taŭga ilo por pliprofundigi la interkompreniĝon kaj amikecon inter la diverslandaj popoloj. La tuta esperantistaro ja multe ŝuldas al la esperan-

tistaj instruistoj, kiuj faris multe en disvastigado de la internacia lingvo. Vi samas kaj samas, alportante freŝan sangon al la Esperantomovado.

Via konferenco estas grava kaj signifoplena.

Ni elkore deziras al vi grandajn progresojn en via estonta laboro kaj brilajn sukcesojn al via konferenco.

Alipoŝte ni sendos al via organizo unu pecon de la silk-tekstita portreto de Zamenhof kiel donacon.

Ĉina Esperanto-Ligo

Saluto de Tejo.

Saluto al la ILEI-konferenco 1980.

En la nomo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo mi kore salutas la ĉi-jaran konferencon de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Niaj du organizoj havas similajn celojn; ILEI laboras por disvastigi Esperanton inter lernantoj, TEJO por tion fari inter gejunuloj — do inter lernantoj kaj ekslernantoj. Estas logike, ke ni bone rilatu unu kun la alia (kaj mi kredas, ke ni tion faras) kaj estas dezirinde, ke ni starigu pli proksiman kunlaboron. En tiu rilato estas notinde, ke TEJO kreis en 1979 estraran funkcion pri edukado, kaj starigis eldonadon pri simplaj instrulibrooj kaj legolibroj taŭgaj por junuloj. UEA enkondukis fine de 1979 favoran oferton por novaj junaj membroj malpli ol 18-jaraj. Ĝi tion faris laŭ rekomendo de TEJO. Ĉio ĉi signas niaflankan konstaton pri la graveco altiri pli junajn komencantojn al la Movado.

Viajn laborojn motivu firma konvinko pri tiu nepra neceso efike instrui al junuloj Esperanton. Sukceson en viaj diskutoj kaj bondezirojn por agrabla kaj utila konferenco.

Stefan MacGill
Prezidanto de TEJO

Salutvortoj al la konferenco: parolas Sonnabend:

Sinjoro profesoro Kremona, prezidento de la Alta Kortumo de Malto.

Honoraj reprezentantoj de la ŝtato, estimataj gastoj, karaj geamikoj,

De la 15-a ĝis la 18-a de Februaro ĉi-jare vizitis vian ŝtaton la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, sinjoro M'Bow.

Li estis akceptita de vi, sinjoro prezidento, konsultis sinjoron Mintoff, la ministroprezidenton kaj membrojn de la registaro.

Interalie estis diskutataj la problemoj de la restaŭrado kaj konservado de la unikaj kulturaĵoj de la insulo.

S-ro Bow eksplikis:

Malto, situanta en la koro de la Mediteraneo, renkontiĝa punkto inter Eŭropo kaj Afriko, estis ĉiam lando de gastamo, krucvojo de intertrafiko.

Li ankaŭ diris, ekskursante en vian historion, ke en tempospaco de sesdek jarcentoj la insulo estis vidanta ekstreme vastajn diversajn popolojn alvenantaj kaj forirantaj:

Bizancanoj, araboj kaj Normanoj kiuj alterne okupis la insulon kaj profunda impresoj estis postlasita per la Kristanismo kaj Islamo.

La Ĝenerala Direktoro aldonis:

“Kiel rezulto nek estas urbo nek vilaĝo la fiereco sola; t.e. evidente admirindaj monumentoj, fortikaĵoj, vilaĝoj, tomboj aŭ katakomboj.

En la antikva ĉefurbo Mdina la Araboj, la Normanoj kaj sennombraj feŭdaj lordoj konstruis pompajn palacojn”.

Li daŭrigis, ke la nobeloj de la ordeno de St. John konstruis grandegajn areojn da fortikaĵoj ĉirkaŭ la insulon en implikaj labirintoj de remparoj, bastionoj kaj eksteraĵoj fosaĵdeklivoj.

La katedraloj kaj preĝejoj kaj aliaj konstruaĵoj estas la atestoj, fenomenaj ondo de kultura evoluo aŭ la talento de la Maltaj artistoj kaj metiistoj.

Tiam s-ro Bow listigis viajn kulturajn zorgojn:

Multaj majstroverkoj estas en danĝero. La detruoj per la tempo kombine kun la damaĝo kaŭzita per la homo videbliĝas en nombro da lokoj, da konstruaĵoj kaj artaj laboroj estas devalorigitaj.

Ekz. La Hypogenum en Hal Saflieniĝa raraĵo en la tuta mondo: estas necese strikte kontroli la temperaturon kaj humidon por elimini algojn kaj likenojn kiuj konstante atakas la kolorajn dekoraĵojn.

En Mdina parto de fortikaĵo enviciganta la palacon de Viheno kolapsis kaj minacas la tutan strukturon.

En Gozo elfosaĵoj estis komencantaj por ĵeti novan lumon pri la rolo de Malto kiel renkontejo de la mediteranea kulturo.

Fortikaĵo St. Elmo, triumfo de militistara baroka kulturo devas submeti sin al grandega nova operacio.

S-ro Bow diris, ke UNESKO entreprenas serion da paŝoj por protekti viajn kulturajn.

Ankaŭ invitis la Ĝenerala Direktoro internaciajn organizaĵojn dediĉi ilian atenton al la giganta tasko savi kaj konservi la grandan kulturen heredaĵon.

Estas hazardo ke nia Ligo venas konferenci en via ŝtato samjare kun la vizito de s-ro Bow, sed ne estas hazardo ke nia Ligo realigis ĉi-jare sian konferencon en Valletta.

Nia konferenco koincidas kun la intencoj kiuj gvidis la Ĝeneralan Direktoron de Unesko al Malto. La demando pri via edukada sistemo, via kulturo ne nur interesas nin sed ankaŭ apartenas al nia celo: Edukado al estimo de la homo kaj interkompreniĝo inter la popoloj.

Se ni volas eduki niajn infanojn laŭsence de nia celo ni devas mem veni por studi vian landon, vian popolon kaj vian kulturon. Instruistoj volonte instruas, tio estas ja ilia profesio, sed sincere dirite tie ĉi ni volas esti viaj gelernantoj por lerni de vi.

Edukado — ĝiaj tendencoj kaj la intencoj de ILEI

-festparolado-

Helmut Sonnabend

Ekde tiam kiam la homo ekestis en la mondo li okupiĝas pri edukado kaj la literaturo pri ĝi estas verŝajne la plej abunda. Ĉu estas pensebla homo sen edukado? *Kaj* permesata estu la demando, ĉu homo sen edukado estus vivkapabla?

Sed kio estas edukado?

La respondo al tiu ĉi demando ne estas tiel facila kiel ĝi estas starigita.

Estas ja la tasko de la homo eduki la homon kaj per tio estas dirite, ke la edukado ne nur rilatas la infanon, la homo estas celo de ĉia edukado.

La homa socio abundas per la diversaj edukperceptoj. Edukado ekvivalentas en la germana lingvo al "Erziehung" kaj baziĝas sur la verbo "ziehen", esperantlingve "tiri". Tio signifas oni tiras la infanon.

Kien?

Certe tien, kie la edukisto mem staras.

Alie dirite, al kiu bildo li edukas?

Neniu povas eduki, *sen havi* proprajn valorimagojn.

En la antikvo estis la idealo la *heleno* — la unuiĝo inter korpo kaj spirito, aŭ la *antikva homo*, interligo inter greka kaj romia epoko, strebante humanisman koncepton,

la *kristana homo*, kies baza motivo estas la amo al la homo,

la *islama homo*, kies unu baza kolono estas la malavaro al malriĉuloj,

la *hinduista homo*, kies devo estas ami kaj savi ĉiajn vivantaĵojn,

la *budista homo*, neglektanta la realan mondon kaj serĉanta la nirvanon,

la *socialisma homo*, kiu turnas sin kontraŭ la ekspluato de la homo per la homo,

la *komunisma homo* strebanta krei nur unu homan klason kaj dirante, ke nur la reala mondo povas doni al la homo la feliĉon,

la *demokrata homo*, kiu post diskutado kaj argumentado aprobas la decidon de la plimulto ĝusta.

Nun ni havas la plej diversajn homojn: kristanajn, islamajn, hinduistajn, budistajn, socialismajn, komunismajn kaj demokratajn kaj certe estas ankoraŭ dekoj da nuancoj.

Por mi leviĝas la demando:

Kie estas la homo — la homo per si mem?

La fama poeto Schiller poemis: La homo estas libera eĉ tiam, kiam li naskiĝis en ĉenoj.

Ni rigardu iom lian liberecon!

La homo tre forte dependas de la socio, en kiu li vivas.

Li estas ankaŭ *verko* de ĝi.

Li devas fari kaj lasi, kion la socio postulas de li.

Vaste dependas la socia homo de la de li ek trovanta socia strukturo. Ĝi gravuras la homon al angla aŭ germana, hinda, franca, usona, sveda ktp. fizionomioj.

Ne nur la lingvoj disigas la homojn, sed ankaŭ tre gravaj estas la diversaj moroj kaj kutimoj, kiuj fremdigas la homon al la alia.

Ankaŭ la naturo destinas la homon: malsato, soifo, malsanoj, pluvo, sekeco, malvarmo, diversecoj de la pejzaĝoj submetas lin kaj li faras tion, kion la naturo de li postulas.

Sed fine tiu homo — tiu plej stranga estaĵo, tiu unikaĵo — tiel dependanta de la naturo kaj socio estas kiel Pestalozzi profunde konstatis **ankaŭ verko el si mem**.

Jen li estas en la senco de Schiller vere libera!

Nenia sklavado, *nenia* enpenetrado en lian personecon, *nek* turmentadoj, *nek* sciencaj metodoj por deformi la menson kaj spiriton, *neniaj* psikiatriaĵoj metodoj pere de drogoj kaj medikamentoj kapablos detruji la kernon de lia libereco: *la homan dignon!*

Jes, oni kapablas influi la homon, ke li diru tion kaj tion, oni devigas la homon, konfesi ĉion, kion oni volas aŭdi de li.

Historiaĵoj ekzemploj abundas.

Tamen! La digno de la homo restas netuŝebla. Oni povas mortigi ĉion en la homo sed neniam lian dignon.

La digno de la homo jam ofte *ofendita*, puŝita, vundita kaj tretata estas la garantio por la homo ke li estas homo. **La homa digno devas esti elirpunkto de ĉia edukado**. Tiu homa digno estas la bazo de ILEI por ĝiaj edukaj klopodoj, ĉar tiu digno estas nek ŝtata, nek politika aŭ religia, nek genta, rasa, nek komunisma, socialisma. La digno de la homo ne estas riĉa aŭ malriĉa — ĝi estas nur homa — en tiu ĉi punkto la homoj neniam distingiĝas.

Kiu edukado estas nun adekvata al la homa digno? Ĉu tiu, kiu respektas la propran volon de la infano? Kaj surbaze de tiu ĉi respekto helpi evoluigi ĉiujn flankojn de la personaj talentoj?

La demando implicas la respondon.

La infano devas esti *subjekto* de la edukado, ne ĝia objekto.

Helpi venki individuajn malfacilojn, *komprenigi* la homan dignon, *lernigi* estimi ĝin kaj *vek*i la volon trovi la propran destinon, tio estas bazaj principoj ne rezigne-

blaj por nia Ligo.

Edukado same signifas direkti la elvolviĝon de ĉiuj fizikaj, moralaj kaj intelektaj kapabloj.

La **edukado** celas la kleran homon, kiu kapablas, per ĝusta uzado de akiritaj scioj, klare juĝi kaj bone taksi la aferojn.

Ĉiu popola socio evoluigis sian edukon sistemon kaj ILEI ne intencas agiti kontraŭ ĝi.

En nia Ligo membriĝis 33 landoj kaj ok landoj estas reprezentitaj per izolitaj membroj.

Ni estas ligitaj kun niaj ŝtatoj kaj *obeas* iliajn leĝojn, ni *amas* niajn popolojn, ni ne *volas* distingi nin de nia socio, *ni ĉiuj* havas nian politikan konvinkon, *ankaŭ nia* religia kredo ne estas unueca, eĉ *rase* ni estas diversaj, tamen unuigas nin la volo al solidareco kaj unu vorton ni *ne konas* inter ni, la vorton diskriminacio.

Do, ILEI ne *intencas* ŝanĝi aŭ modifi naciajn, gentajn, sociajn aŭ religiajn eduk-sistemojn, sed ĝi volas aldoni pluan aŭ la *mankan* dimension: **la dimensio de la internacieco**.

Kompreneble tiu ĉi tasko kaj samtempa limigado al ĝi ne *malhelpas* nin, *tie* levi nian voĉon, *kie* estas malatentata la digno de la infano — *tiucele* ILEI konsideras sin — *advokato* de la infano.

La pretendo de la homo *garantiti* sian Homan Rajton estu de ni **senkompromise defendata**.

La “Homaj Rajtoj” proklamitaj fare de la Unuiĝintaj Nacioj estas **la akiraĵo** ĝis nun ne atingita en la historio de la homaro.

Tiuj rajtoj — *la bazo de ĉiu edukado* — *ne estas* donacitaj, ili estas alnaskiĝintaj kaj ne fordoneblaj rajtoj, sendepende de ĉio kaj ĉiu.

Homa digno kaj *homaj rajtoj* estas *la kolonoj* sur kiuj ILEI konstruas sian eduk-sistemon.

Konscia internacia edukado estas manko en niaj ŝtataj instruplanoj. Ekzemple en Germanio oni povas legi en la direktivoj pri la instruado de la angla lingvo: “Necesas internaciaj kontaktoj, kaj la gelernantoj akiru la kapablon paroli duan lingvon.

Pro kaŭzoj de la utileco tio devus esti la lingvo kum la plej granda vastigado, — do, la angla.

Per la lernado de la angla lingvo la infanoj ricevos la eblecon al kontaktoj kun homoj de aliaj nacioj.

Ili disvastigas per tio sian spertan horizonton kaj tiel akiras pli gravan antaŭkondiĉon: por la internacia kompreniĝo *fariĝi* respondecaj civitanoj”.

Nur **laŭ la intensa instruado de la angla lingvo en la lernejoj de la mondo** ĝi jam devus esti *plena* de respondecaj civitanoj.

La vera praktiko ja estas, ke en Eŭropo dominas kvar lingvoj: la angla, la germana, la franca kaj la rusa.

Apogi kaj preferi nur ilin *estus vera* diskriminacio kontraŭ miliardoj da homoj.

Homaj rajtoj kaj homa digno postulas pli vastan internaciecon.

Nia eduka tasko estas *komprenigi* al niaj infanoj la efektivajn *multtavolajn* pro-

blemojn.

Ni internaciaj instruistoj devas zorgi *por pli granda sinalproksimiĝo* inter la lernejoj, klasoj, infanoj de la mondo.

Ne plu estu sensacio kiam itala lernejo klaso renkontiĝas kun hispana, sed *fariĝu kutimo*, ke malta klaso havu kontakton kun klaso en *Zairio*, ke infanoj en Francujo korespondu kun infanoj en Pekino, gelernantoj en Teherano skribu al infanoj en Tel-Avivo, ktp.

Per tute *simplaj konkretaj* kontaktoj la infanoj *lernu*, ke ĉiuj popoloj havas la saman rajton por vivi kaj evolui en propraj limoj.

Se estas amikaj kaj intimaj rilatoj inter infanoj el Germanujo kaj Vjetnamujo la infanoj lernas, ke homoj de la alia popolo havas alian pensmanieron.

La dua paŝo por la instruisto: *Li* komprenigu, ke komoj de aliaj popoloj posedas sian propran valoron.

La internacia instruisto de ILEI nodu *tuj kontaktojn* inter sia klaso kun klaso en Hindujo kiam li aŭdos pri malsatmizero.

La infanoj lernu *tuj solidariĝi* kun infanoj en la mondo suferantaj mizeron.

Kiam la infanoj ekz. en Massa ekscios pri la nesufiĉa lerneja ekipo en Tananarivo ili eble iniciative ekagos por mildigi nesufiĉecon.

Internacia edukado veku la senton de infanoj el evoluintaj landoj al solidareco kun infanoj de evoluantaj kaj evoluontaj landoj.

Sed ankaŭ la *simpla infana vivo* estu en la kadro de internacia edukado. ILEI helpu la infanojn fondi *delegitan reton* en kiu infanaj ambasadoroj peru dezirojn pri Ŝporto, turismo, tekniko, diska muziko, lernejo, infana vivo, ktp.

Tiu vojo al vasta internacieco *ne necesas alian* fremdlingvan lernsistemon.

Lernante la anglan lingvon, mi lernas *pensi angle* sed *ne internacie*, kaj tio validas por ĉiuj naciaj lingvoj.

Mi nomis kvar dominantajn lingvojn en Eŭropo, sed al la angla, franca, germana kaj rusa lingvoj — pro justeco ni aldonu la ĉinan, proksimume parolas ĝin unu miliardo da homoj.

Kvin-lingva mondo ankaŭ *ne servus* al internacieca mondo.

Kie estas la solvo?

Ni *aŭskultu* kion rezoluciis la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo en la jaro 1954:

... diskutinte la raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Peticio favore al Esperanto,

notas la rezultojn atingitajn pere de Esperanto sur la kampo de la intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimiĝo de la popoloj del' mondo, rekonas, ke tiaj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO.

La internacia Ligo varme aprobas la rekonon de UNESKO. *Ĝi* elektis pro siaj internaciaj rilatoj kaj kiel *interna komunikilo* la lingvon Esperanto.

ILEI estas konvinkita, ke ĝi per tiu ĉi lingvo povas kontribui al *vera* internacia edukado.

Perhelpe de Esperanto la infanoj evoluos al mondcivitanoj sen perdi sian nacian identecon.

Mi finu mian prelegon per vortoj de Ivo Lapenna, prezidanto de UEA ĝis 1975:

La homa socia naturo montras hodiaŭ tri ĉefajn aspektojn, kiuj respondas al la tri fundamentaj kadroj de kunvivado: la regiono, la nacio, la homaro.

Al la du unuaj aspektoj respondas du diversaj lingvoj: la loka dialekto kaj la literatura lingvo. Al la tria aspekto povas respondi nur neŭtrala, supernacia lingvo.

Kaj li absolute pravas, kiam li aldonas: ju pli la homaro manifestiĝas, des pli vaste la Internacia Lingvo estos uzata.

Mi deziras inversigi la konstaton: Ju pli vaste la Internacia Lingvo estos uzata, des pli klare ni atingos nian adukan celon: la manifestiĝon de la homaro.

Parolado de lia ekscelenco la ĉefjuĝisto profesoro J.J. Cremona okaze de la malfermo de la 14-a internacia konferenco de la esperantistaj instruistoj ĉe la mediteranea centro por la konferencoj, Valletta, vendrede, la 25-an de julio, 1980.

Mi deziras komenci dirante al vi ĉiuj, esperantistaj instruistoj, kiuj el la tuta mondo renkontiĝas unuafoje en nia insularo, ke mi tutkore bonvenigas vin. Mi pensas ke mi nek uzas senutilajn vortojn nek fanfaronas pri mi mem aŭ pri mia lando, se mi aldone diras al vi, ke tiu ĉi lando ĉiam estis mondfama pro la afabla bonveno kiun ĝi scias doni al ĉiuj alilandanoj kiuj vizitas ĝin. Efektive mi diras tion ne nur laŭ mia malforta atesto, sed ankaŭ laŭ tiu forta kaj estara elokventa atesto, kiun oni povas trovi en unu el la plej elstara verkistoj de la antikva epoko, la Evangelisto Sankta Luko. Kiam en la jaro 60 post Kristo, la Apostolo de la Gentoj Sankta Paŭlo kune kun li kaj aliaj vojaĝis al Romo sur roma velŝipo, kiu en terura ŝtormo disrompiĝis sur la rokoj de nia lando, Sankta Luko sentis, ke li devas memorigi por ĉiam en la Agoj de la Apostoloj la bonvenon kiun niaj prapatroj donis al tiu maristo kaj la tre grandan afablecon, kiun ili montris al li. Mi esperas, ke kiam ĉiu el vi reiros al sia lando devos ankoraŭ atesti, ke en ĉi tiu trajto la Maltanoj ne sangiĝis.

Bonvenigante vin mi ankaŭ deziras gratuli vin pro la fakto ke vi, membroj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj elektis tiujn ĉi insulojn por via 14-a Internacia Konferenco, ĉar en tiu ĉi malgranda lando, oni trovas longan historion kaj noblajn idealojn. Kiel ankaŭ pro la fakto, ke ĝi troviĝas meze de la Mediteranea Maro oni povas diri, ke ĝi troviĝas sur la vojkruciĝo de diversaj civilizacioj. Do mi sincere diras al vi, ke tiu ĉi insuleto estas ankaŭ grava ponto.

Kaj do sekvas la idealo de via Ligo kiu klopodas disvastigi tra la mondo unu lingvon, kiun ĝi tenas ankaŭ kiel ponton inter la nacioj de la mondo. Baldaŭ pasos cent jaroj ekde kiam D-ro Zamenhof kreis kaj prizorgis la internacian lingvon, eĉ supernacian, faritan el naturaj radikoj kaj ankaŭ evoluintan laŭnature. Ĝi estas fonetika lingvo. Hodiaŭ oni ankaŭ trovas sufiĉe grandan kvanton da literaturaĵoj kaj originalaj kaj tradukitaj. La celo de la aŭtoro estis tiel helpi kaj fortigi komunikilojn in-

ter la popoloj de la mondo kaj ke riĉiĝu la amo kaj kompreno precipe kie ili entute mankas.

Multaj estas la lingvoj de la mondo. Multfoje ili ankaŭ donas al la nacioj ilian identecon. Ankaŭ tiu ĉi eta lando havas sian lingvon kaj ĝi estas tiu per kiu mi nun parolas al vi. Ni ankoraŭ uzas nian lingvon kvankam nia lando dum la jarcento pro historiaj sortŝanĝoj havis multajn regantojn. Ĉiu amas sian lingvon, eĉ ĉiu estas fiera pri ĝi. Sed mi scias ke via Ligo neniam songas ke ĝi malgrandigos aŭ detruos ĉi-tiun senton. Kontraŭe ĝi malkaŝe deklaras, kiel devas esti, ke ĝi respektas ĉiujn naciajn lingvojn.

Estis Lytton Strachey kiu diris ke eble la plej mirinda kreaĵo de la tuta homaro estas la lingvo. Kaj mi pensas ke tiu taŭgas ankaŭ kun pli granda forto por la lingvo, kiu provas sin levi super ĉiujn aliajn lingvojn por ke ĝi unuigu ĉiujn naciojn de la mondo. Sed mi aldonas ke la lingvoj tutsole, estas rezultoj tiel mirindaj de la homa saĝeco. Sed tamen se oni rigardas ilin el tute pli vasta vidpunkto, oni trovas, ke finfine ili sukcesas ankaŭ malamikiĝi la popolojn kaj kelkfoje bedaŭrinde, ankaŭ en la sama nacio.

Kiel juĝisto de la Europa Kortumo pri homaj rajtoj, mi mem spertis tion ĉi en la famaj lingvaj problemoj en Belgio. Mi nun volas preni la okazon por aldoni, ke kiel unu kiu kredas tutkore je la homaj rajtoj ĝojas vidi ke estas la homa digno pri kiu via Ligo deklaras entaŭen marŝi en ĝia eduka laboro kiu disvastiĝas tra la tuta mondo.

Estas el tiu ĉi vidpunkto ke la lingvo, kiun vi deziras instrui al la tuta homaro atingas sian veran gravecon kiel komunan kaj universalan lingvon, kiu anstataŭ dividi unuigas la homaron.

Do kiel ilo por la unuigo en mondo kiu malfeliĉe estas ankoraŭ tiel dividita oni povas diri, ke la estroj kaj la apostoloj de la paco akceptos ĝin.

Unuigo kaj paco estas du konceptoj kiuj krom trovitaj sur ĉies lango oni deziras ilin vidi en ĉies menso kaj koro. Ĉar se oni farus tiel, tiom da maltrankvilo malaperus. Kaj la homo kie ajn sin trovas kaj apartenante al kiu ajn popola rango li povus memfide rigardi pli belan kaj pli bonan mondon.

Mi deziras lasi al vi tiun ĉi mesaĝon por ke vi komencu vian utilan laboron dum la venontaj tagoj. Mi tutkore esperas, ke via laboro estos fruktodona kaj mi same esperas ke finfine tiu ĉi rezulto estu utila por la unuigo kaj paco en la mondo.

Rezolucio de la 14-a konferenco de ILEI

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kunvenante en Cottonera, Malto, okaze de ĝia 14-a Internacia konferenco de 24.7. ĝis 1.8. 1980

- pritraktante edukadon, analfabetismon en la mondo kaj la kulturon en la Respubliko Malto kaj la mediteranea regiono,
- konstatante la nesufiĉecon de edukado al humaneca internaciismo,
- konsiderante la multnombrecon de analfabetoj en la mondo,

- kaj konkludante ke unuflanke pro diverĝeco de la instruado de fremdaj lingvoj kaj aliflanke pro la nekapablo legi, konstante ekestas gravaj homaj problemoj, proponas:
- por pli vaste disvolvi internaciajn kontaktojn inter lernejoj klasoj plej diversnaciaj uzigi kiel interligon la Internacian Lingvon Esperanto,
- por mildigi la analfabetismon en la mondo eksperimente elprovi en almenaŭ unu ŝtato en kiu estas alta procentaĵo da analfabetoj la projekton (vidu aldonajn) kiu ebligas al infanoj, ekzemple ne havantaj propran alfabeton, skribi laŭsone la etnan lingvon kaj pere de ĝi pli rapide kaj facile lerni lingvan alfabetan sistemon,
- akcepti kaj sekvi la gravan alvokon de s-ro M'Bow, Ĝenerala Direktoro de UNESKO, alporti helpon por savi la plurimiljaran kaj unikan kulturon en Malto kaj tiel ankaŭ kontribui al la konservado kaj evoluado de la kulturaj aspektoj en la mediteranea tereno.

En la nomo de la konferenco
la prezidanto de ILEI

Letero al s-ro Bow, Ĝenerala Direktoro de UNESKO.

Tre estimata s-ro Bow!

La 14-a konferenco de ILEI okazis ĉi-jare de la 24.7.-1.8. 1980 en Cottonera, Malto. Ni rememorigis en nia publika inaŭguro al via vizito en Februaro kaj emfazis viajn vortojn pri la neceseco protekti la unikan kulturon en Malto.

Via alvoko estas entenata en mia rezolucio rektita al gravaj instancoj en la mondo kaj distribuita per nia internacia reto.

Alia signifoplene kaj sociograva laborpunkto estis la netolerebla stato de la analfabetismo en la mondo. Nia organizaĵo deziras konkrete kontribui al solvo de la problemo.

Aldone vi trovos ekzemplojn de diversaj lingvoj kies parolantoj estas desegnitaj per unu sona alfabeto. Jen estas la ebleco skribi kaj figurigi la sonojn de lingvoj ne havantaj propran alfabeton.

S-ro Ĝenerala Direktoro, evidentiĝas la reala ŝanco mildigi la analfabetismon. Ne estas eble doni al vi ĉiujn detalojn de nia projekto, la legado estus pro vi tro tempo-raba. Tial mi petas vin, doni al mi la okazon esti de vi persone akceptata.

Bonvolu informi min kiam mi en Parizo povos viziti vin.

Altestime kaj sincere
Helmut Sonnabend

Aldonaĵoj:

1. Rezolucio
2. Ekzemplaj skriboj

Grava propono de la 4-a studgrupo de 14-a ILEI-konferenco en Malto

Metodika kaj didaktika servo de I.L.E.I.

Partoprenas al tiu ĉi grupo;

- 1) Pederenzini (instruas en elementa lernejo)
- 2) Codice G. (instruas al plenkreskuloj)
- 3) Neri Lami Lidia (instruas en elementa lernejo)
- 4) Incoronato Rolando Pia (instruas al instruistoj en baza lernejo)
- 5) Montalbini A. Maria (instruas en mezgrada lernejo)
- 6) Olivieri G. (instruas en elementa lernejo)
- 7) Signoret (instruas al plenkreskuloj)
- 8) Uittenbogaard P. (instruas ekster la lernejo)
- 9) Kovač (instruas en mezgrada lernejo)
- 10) Codice F. (instruas en mezgrada lernejo)
- 11) Bolcato L. (instruas per korespondado)

La diskuto komenciĝas per propono de P. Uittenbogaard t.e., listigi la jenan:

- 1) ĝenerala instruado
 - 2) lerneja instruado (elementa lernejo kaj aliaj)
 - a) dum lernejoj
 - b) ekster lernejoj
 - 3) rezultoj, celoj
 - 4) kia metodo (rekta aŭ nereakta)
 - 5) Instruiloj (kiaj, kaj kiu stoko jam ekzistas)
 - 6) Atingebleco de la instruiloj
 - 7) Kiel reprodukti la instruilojn
 - 8) Kiel konvinki la gekolegojn, la gepatrojn kaj la estrojn de la lernejo
 - 9) Varbado
 - 10) Kiel helpi la landojn en kiuj ne estas esperanta instruado
 - 11) Kion povas fari I.L.E.I.
- Signoret proponas la forstrekon de la punktoj 9, 10 kaj 11 per voĉdonado, la plejmulto akceptas la proponon.
- Dum la unua labortago oni elektis la numerojn:
- 4) kia metodo, rekta aŭ nereakta
 - 5) instruiloj: kiu stoko ekzistas kaj kiaj instruiloj.

- Antaŭ ol diskuti la du punktojn parolas:
- Pederzini M. kiu priskribas la funkciadon de la vort-bildkartoj kiujn ŝi uzas en elementa lernejo kaj ŝi donas praktikajn informojn pri ilia uzado
 - Signoret kiu priskribas la funkciadon de la vitroprojekciiloj
 - Uittenbogaard kiu parolas pri la gramatikaj memorkartoj kaj Cseh-metodo, ekzemplo de rekta metodo, li daŭrigas dirante, ke en Nederlando ekzistis televida kurso, kies metodo estas laŭ li tro komplika.
 - Kelkaj el la partoprenantoj en la laborgrupo ne uzas presitajn tekstojn, pretigante persone ĝin por la instruado.
- Revenante je la kvara punkto, jen la listo de la iloj per rekta aŭ nereakta metodo:

REKTA METODO

- Esperanto I — Szerdahelyi
- Esperanto laŭ naturmetodo — P. Dao
- Esperanto programita sonbendo Junul Kurso — SAT-eldono
- Esperanto por gejunuloj — G. Taddei
- Esperanto por infanoj — Solomon
- Esperanto Kurso per diskoj laŭ la pola metodo
- Sub la verda standardo — Kortei
- Skriba kurso de F.L.E.
- Cseh-Metodo — I.E.I.-eldono — Le Hague — Nederlando
- Paŝoj al plena posedo — W. Auld

NEREKTA METODO

- Cours rationnel — SAT eldono
- Impariamo l'Esperanto — M. Bardini
- Esperanto: rivoluzione della parola — V. Dall'Acqua
- Corso di Esperanto — A. Menabene
- Por la praktikantoj - Babin - Kultur Domo - Grésillon
- Jen nia mondo — Fei - Milano
- Leerboek Esperanto Zondervan - Leerboek Esperanto — De Korte
- Instruu vi mem - por memlernantoj

TAŬGAJ ILOJ POR LA INSTRUADO DE ESPERANTO

- Lumbildoj
- Diskoj
- Sonbendoj
 - a) por aŭskulti profesoron
 - b) por aŭskulti lernanton
- Bildserioj - por individua laboro
- Tombolo
- Ansera ludo
- Serio da fabeloj por paroligi la infanojn

- Kanzonoj
- Poemetoj
- Flanela tabulo
- Demando kaj respondkartoj

PROpono AL I.L.E.I. PLI INSTRUiloJ

Ke ĝi donu praktikajn informojn pri la uzado de sonbendoj, kiel gvidlibroj por la instruistoj.

- pri diskoj
- ke I.L.E.I. donu referencatan liston laŭ metodika kaj didaktika vidpunktoj. pri la bild-serioj
- ke I.L.E.I. pretigu gvidlibron kiu enhavas kanzonojn, poemetojn, ludojn, krucvortojn, ktp.

La ĉeestantoj petas, ke la pretigota materialo estu malmulte-kosta (ekz. stencilitaj paperoj), ĉar oni scias, ke instruistoj instruas senpage kaj sen la helpo de la lokaj kaj naciaj instancoj.

KONKLUDOJ DE LA LABORGRUPO

- 1) Celo: Fondi internacian centron de I.L.E.I., kie ĉiu instruanto povos havi informojn pri libroj, metodoj, instruiloj, kaj ekzamenoj.
- 2) I.L.E.I. devas registri kiu stoko da materialo ekzistas kaj ĝia uzebleco.
- 3) Kiel produkti instruilojn.

TASKO DE I.L.E.I.:

- 1) doni informojn al petantoj (vidu n. 1) pere da la jam fondita centro de I.L.E.I.
- 2) havi pruntoservon en ĉiu lando
- 3) eldoni stencilitajn instruilojn.
- 4) Oni proponas sendi la sekvantan cirkuleron al ĉiu sekciestro:

“Ni sendas al vi liston de libroj, kiun ni petas kompletigi per vortaroj studlibroj, legolibroj, poemaroj, kantaraj ktp, nur uzataj en via lando.

Ni petas al vi diri al ni:

 - a) — Kiu kursoj jam ekzistas en via lando (laŭ via scio) kaj kiaj ekzamenoj kaj tekstoj ekzistas
 - b) — Ĉu vi havas helpon de la lokaj instancoj?
 - c) — Ĉu vi pretas funkciigi pruntoservon de studlibroj por via lando?
 - d) — Kiaj testoj ekzistas en via lando?

- 1) traduko-taskoj
- 2) tekstoj kun elektota respondo al preparitaj demandoj
- 3) libera respondo al demandoj
- 4) parolado aŭ konversacio

Konkludante: - la unuanima sugesto de la partoprenantoj al la 4a laborgrupo estas: krei lernejan fonduson de I.L.E.I. al kiu oni povos doni helpon aŭ peti helpon.

Al la Eŭropa parlamento: Memorando de ILEI pri la lingvo Esperanto - ekzemplo por similaj agadoj en la mondo.

Memorando de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj pri la lingvo Esperanto.

Al la
Eŭropaj Komunumoj
Eŭropa Parlamento

Memorigante pri la rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, Montevideo 1954, kiu tekstas:

IV.1.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto;

IV.1.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internacia intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

IV.1.4.4222 Rekonas, ke tiaj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO;

IV.1.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

Atentigante pri la simpozio pri "Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia-eŭropa-lingvo" okazinta je la 17.5. - 19.5.1979 en Parizo -Sorbono- en la kadro de l'U.E.R. de Linguistique Générale et Appliquée, Université René Descartes, kies rezulto tekstas:

La partoprenintoj de la Simpozio "Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia-eŭropa-lingvo",

— priesplorinte kaj pridiskutinte la nunan staton kaj estontajn perspektivojn de la interlingva problemaro,

— konstatis, ke la intensigon de internaciaj kontaktoj kaj la normalajn interrilatojn de homoj parolantaj diversajn lingvojn ĉiam pli akre malhelpas la manko de komuna lingvo,

ke tiun rolon povas plenumi nur politike neŭtrala facile alproprigebla internacia lingvo, kaj

ke la internacia lingvo Esperanto dum sia pli ol naŭdekjara vivo perfekte pruvis sian taŭgecon en ĉiuj funkcioj, postulataj de tia lingvo,

— proponas al UNESKO renovigi siajn konstatojn kaj proponojn formulitajn dum la Ĝenerala Konferenco okazinta en la jaro 1954 en Montevideo,

al la Eŭropa Parlamento meti sur la tagordo de sia venonta Asembleo la temon pri la komuna Eŭropa interlingvo, kaj

komisii al speciala faka komisiono prilabori dekjaran perspektivan planon pri la solvo de la problemoj,

— pruvante la efikecon de Esperanto kiel lerneja fako pere de lernejoj eksperimentoj en la landoj: Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio, Kroatio kaj Slovenio, Belgio, Francio, Germanio, Grekio kaj Nederlando, per kiu montriĝis:

— bona lernefektiveco kaj ekonomio kompare al la lernado de aliaj fremdaj lingvoj,

— la influado de Esperanto al pli bona lernado de la gepatra lingvo,

— la akcelado de legkapabla kaj ortografia evoluadoj,

— la formado de la lingva komprenemo por pli facile lerni aliajn fremdajn lingvojn, kaj

— la kontribuado al eŭropa edukado de la infanoj kaj al humaneca internaciismo.

Konsiderante la decidon de la Eŭropa Parlamento de la 11.12.1978, n-ro C.296/49, ke ĉiuj infanoj en EK ricevu la eblecon, akiri uzeblan konon de almenaŭ unu lingvo de la komunumo, kaj ke ne estas intencate

interne de la EK proponi iun nacian lingvon kiel komunan lingvon, kaj ke ankaŭ estas rifuzite proponi unu vivantan lingvon kiel unuan devigan lingvon por gelerntoj, I.L.E.I. proponas al la Eŭropa Parlamento

— rekoni la rezolucion de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, Montevideo 1954 favore Esperanton implicate por EK,

— konsideri pozitive la rezolucion de la pariza simpozio "Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia-eŭropa-lingvo",

— konkrete apogi la klopodojn de I.L.E.I. intensigi lernejarajn eksperimentojn en la landoj de la Eŭropa Komunumo, kaj implicate

— rekoni Esperanton kiel vivantan lingvon.

En la nomo de la estraro:
(Helmut Sonnabend)
prezidanto de ILEI

2.3.2. Sisteme informi ĉiujn edukajn mediojn:

- la asociojn de lernejestroj;
- la asociojn de geinstruistoj;
- la asociojn de gepatroj;
- la asociojn de studentoj;
- la profesiajn instruasociojn de ĉiuj tendencoj;
- la studgrupojn de ĉiuj politikaj partioj;
- ĉiujn instruistajn seminariojn;
- ĉiujn universitatajn fakultatojn de filologio;
- ĉiujn lingvo-institutojn de la universitatoj.

M. Demonty

Niaj legantoj opinias, raportas.

Estimata Prezidanto,

Mi ne membrigas al ILEI, ĉar mi ne estas instruisto.

Mi abonis ILEI-revuon pro estimo al Esperanto kaj al instruado.

Mi opinias, ke nur humaneca instruado evoluigas la homaron.

Nur kiel leganto mi deziras esprimi mian ĉagrenon kaŭzitan de artikoloj en la n-ro 80/2 de la revuo.

Ne temas pri la aŭtoroj, unu el ili mi jam aŭdis kaj estimas. Sed ili apogas siajn argumentojn sur la marksisma ideologio. Ĉu la marksisma solvo estas la bona por solvi la problemojn? En la mondo burĝece aktiva minoritato krize krevmortas pro egoisma kaptado de la riĉaĵoj; alia parto estas enkarcerigita, deportita, torturita, murdita de faŝismoj, ĉu dekstraj, ĉu marksismaj; la cetero mizere vivaĉas ĉefe pro la regado sur la mondo de la respondeculoj de la du unuaj supre cititaj partoj.

Unu aŭtoro kondamnas la “utopiistajn socialistojn”.

Mi demandas min, se ne estas la socialistoj-utopiistoj, kiuj pravas?

— Homo unue; socio serve —

La kontraŭon imponas tiuj faŝismoj. Ilia koncepto efektive naskas servon ĉiam favore al privilegiuloj, nur ŝanĝas ties fakeco.

miajn esperantismajn sentojn,

Raymondo Doury 68 rue André Joineau F 93310 Le Pré St-Gervais,

Antaŭ 90 jaroj, kiam D-ro L. L. Zamenhof prezentis Lingvon Internacian al la mondo, ne ekzistis teknikaj helpiloj por facile ekspliki kaj instrui la prononcadon de Esperanto. Hodiaŭ ni disponas pri tiuj helpiloj. Estas je dispono gramofonaj diskoj, sonbendoj, kasedoj, diapozitivoj, sonfilmoj kaj eĉ televiziaj sonbendoj.

En la 6-a eldono de Lingva Respondoj (sub n-ro 67) estas citita respondo de D-ro Zamenhof (letero 1901-01-11) al la prozverkisto Ernest Deligny: “La elparolado de Esperanto estas tute konforma (kompreneble krom la supersignitaj literoj) al la latina elparolado, kiu estas uzata en mia lando”. Kiu povas scii, nuntempe, la ĝustan elparoladon de la latina — en kaj ekster Pollando? Estas konate, ke la prononcado de la latina diferencas de lando al lando.

Vizitante esperantistajn kongresojn, konferencojn ktp, oni ne povas ne rimarki, kiel unuopaj esperantistoj ofte malklare kaj evidente erare prononcas kelkajn silabojn kaj vortojn. Oni komprenas tion, sciante ke la prononcado de la gepatra lingvo ofte tra la tuta vivo sekvas kaj influas la elparolon de la parolanto, kiam li uzas novan, post gepatra lingvo lernitan lingvon. Pli grave estas, ke kelkaj esperantistoj

erare lernis jam de komence kaj nur kun granda peno — pli poste — povas plibonigi sian prononcadon.

Ne ĉiuj havas okazon ofte aŭskulti kaj paroli Esperanton en translimaj rilatoj. Same, ne estas eble por ĉiuj konstante ekzerci la lingvon per aŭskultado de disaŭdiĝoj en Radio. En lernolibroj la verkistoj provas espliki la sonojn de la silaboj kun supersignitaj literoj, instrui la nepran distingon n-g kaj n-k, la elparolon de la diftongoj -aj, -oj, -uj, aŭ kaj eŭ. Bedaŭrinde, tiu instruado ne ĉiam estas sukcesa.

Estas dezirinde, ke la Akademio de Esperanto, helpe de siaj ekspertuloj (fonetikiŝtoj), fine *iniciatos* eldonadon de modernaj helpiloj. Nur la Akademio mem povas decidi pri sankcio aŭ rekomendo de tiaj helpiloj, kiujn la esperantistoj — ne malpli instruistoj kaj lernantoj — urĝe bezonas.

Lennart Aberg, Gotenburgo

Salutojn de Aŭstralio.

Okazis la Kvinzlanda Esperanta Federacia Konferenco la lastan semajnfino. Aranĝis kaj estris, la Ipswich Esp. Grupo.

Miris mi, pri la praktika aranĝo. Ĉiu estis loĝita en 'Motelo' (malgranda tranokta ĉambrokompleto). Brilegis la suno post du pluvaj tagoj.

Je la dua, komenciĝis la konferenco. Ĉiam interesis min aŭskulti novaĵojn de la aliaj kvinzlandaj esperanto kluboj, kaj kiel progresis la poŝtskriba kurso de esperanto. Poste, ĉiu pretigis sin por la vespera aranĝo.

Oni sinhelpis al 'punĉo', kaj rigardis la aĉeblajn objektojn elmontritajn surtable. Ĉefa celo de la vendado de la diversaj donitaj objektoj estis por gajni monprofiton por la federacio. Poste, ni informiĝis, ke la gajno estis pli ol cent dolaroj!

Manĝaĵo bongusta, estis servita antaŭ ĉiun gesinjoron. Oni plenigas sian glason per ĉies preferata trinkaĵo, kaj ĉiu kontente manĝis aprobante la kolorplenaĵn aranĝojn de ĉiu tablo, kaj ĉies havaĵojn.

Amikeco ridete interŝanĝis, esperanto elbuŝe fluadis, samideanoj sentis sin hejme sub la verda stelo.

Kiam la manĝaĵo finiĝis, regalis nin la Ipswich esperanta grupo per teatraĵeto pri pioniraj periodoj -jaro 1825. Duopa dancado, kantgrupoj kaj diversaj varieteoj amuzigis nin ĝis la deka horo.

Frue, je la naŭa atm, kolektiĝis nia grupo dimanĉan matenon. Loka estimata historiistino gvidis nin, kaj rakontis pri gravaj historiaj lokoj kaj konstruaĵoj ekzistantaj en Ipswich. Pro ŝia rakonto, mense vagis nin en la pasinteco de la Aŭstralianaj pioniraj tagoj. De lokoj al lokoj, ni karavanis aŭtomobile.

Fininte la organizitan historian ekskurson, la esperanta grupo troviĝis en piknika loko apud rivero.

Kun rapideco, niaj viroj funkciigis porteblajn gasfornojn kaj komencis kuiri kolbasojn kaj aliajn viandojn. Ĝemis la tablo plena de salato, buloj, fruktoj, kaj multe da bongustaj manĝaĵoj. Bolis la akvo. Ĉio estis preta, kaj mi sentis min kiel "La Gaja Svagman" en la kanto -

"Sidante apud bilabong
Kie la Koolibah (arbo) ja ombris lin,
Kaj li kantis, atende, ĝis bolis la bilipot (teopoto)
Vi valzigados Matilda kun mi..."

Rostfesto bongusta, surtere sidantaj, ni aŭskultis al Tomo. Apogante sur arb-trunko, natura barbulo Tomo, rakontis fabelon esperante, ... hipnotizanta nin pri mirindaĵoj okazantaj!

Karavane, ni iris al malnova domkonstruaĵo (*malnova* signifas centjaraĝa!) de Aŭstralio. Ni vidis pioniran domon kaj pezajn, malmodernajn ilojn uzitaj je tiu tempo. Trapaŝis ni scivole pli da ses ĉambroj, kaj poste, sidante ĉe malgrandaj tabloj en la bela ĝardeno, la estrino regalis nin per 'Damper kaj Bili Teo' - (specialaĵo de pioniroj)

Alvenis la fino de la konferenca semajno. Kvankam feliĉaj, triste disiĝis kvinzlandaj esperantistoj. Al mi ŝajnas, ke ĉiu semajnfino superas la antaŭan pri interesaj belaj aranĝaferoj.

Annie Spencer (Bibliotekistino de Brizhana klubo kaj Instruistino per Cseh metodo)

Pli ol lingvo.

Okazas kelkfoje, iomete da ĝeno pro diversaj opinioj en la funkciado de la Esperanta Movado, aŭ lokaj grupoj, aŭ kongreso kaj tiel plu.

Gesperantistoj estas pensemaj homoj, kiuj havas diversajn ideojn, kiuj volas kaj povas sinkontribui.

La ĝeno povas komenci, post kiam iliaj laboroj, iliaj ideoj estas neakceptitaj; ili sinofendiĝas, kaj en iuj okazoj, forlasas aŭ movadon, aŭ facon.

Estus bone, se oni avertu sin kontraŭ tiu sento... oni ne rajtas forgesi, ke Esperanto, la universala lingvo, valoras pli ol "personecoj", pli ol "iomete da sinĝeno". Bone estus, ke la idealo de Esperanto ĝus entenuita en la menso; la sola ĉelo ĉiam devas esti "La disvolviĝo de la Esperanto movado por Universala Komunikado kaj Paco

aŭ - INSTRUISTOJ KAJ INSTRUANTOJ

aŭ - ATENTU! (NE)-GEINSTRUISTOJ

Kiel instruantoj de esperanto, (ne) geinstruistoj ludas gravan rolon en la disvolviĝo de la universala lingvo.

Povas esti ke, geinstruistoj de la lernejo estas en la nova grupo de gelernantoj en la Klubo. Montru al ili, ke ILEI meritas aniĝon pon atentigi la edukadan kadron.

Do strebu! klopodu! daŭrigu la studadon ĉiu diligenta esperantisto! por atingi la nivelon de einstruanto, por ke vi helpu la prezentadon de esperanto en niajn lernejojn.

Annie Spences Australia

Kara Redaktoro!

Bonvolu anonci mian koresponddeziron en via ĵurnalo. "30-jara hungara instruisto de Esperanto, angla lingvo kaj geografio deziras kontaktiĝi kun similuloj por ekkoni kaj gastigi unu la alian, eble kun familio. Timár Gábor, Budapest, Hungaria 39. H-1192"

Dankeme via

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo	Jean Lehane, 2A Harms st., Toowomba, Queensland 4350
Aŭstrujo	Ernst Rixner, Kleingasse 6, 18/8/13, A-1030 Vieno
Belgujo	E. Van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal
Brazilo	Elvira Fontes, C. P. 5888 São Paulo
Britujo	Hilary Chapman, 7 Fairacre road, Barwell, Leicester LE9 8HH
Bulgarujo	Aleksiev, N.B., kv. Istok, blok I, vh II – Sofio
Danujo	Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre
Finnujo	Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo	Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont
F R Germanujo	Helmut Sonnabend – In den Horstwiesen 42 – 315 Peine
Grekujo	K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506)
Hispanujo	Francisko Zaragoza Ruiz, Coll. Nacional, Callosa de Segura, Alicante
Hungarujo	Zsuzsa Barcsay, Bem Kp. 25/b, H-1011 Budapest
Islando	Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík
Israelo	Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv
Italujo	Catina Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa, pĉk. 22-2883
Japanujo	Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343
Jugoslavujo	Miodgrad Stojanović, Duruntorska ul. 2:IV-32, YU-11000 Beograd
Luksemburgo	Robert Hoenerger, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette
Kolombujo	Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellin
Koreujo	---
Malagasujo	Eugene Raveloson, B P 127, Antananarivo
Nederlando	Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl
Nordameriko	John L. Lewine, West Stockbridge, MA 01266
Norvegujo	Elna Matland – Brekkev 50 – 4200 Sauda
Nov-Zelando	Gvenda Sutton, 1 Wood street, Upper Hutt
Polujo	Stefania Pakalska, Marszalkowska 53, m. 50, PL-00-676 Warszawa
Rumanujo	---
Sanmarino	Marina Michelotti, via 25 marzo 73, I-43031 Repubblica di San Marino
Sovetujo	Johannes Palu, Sólme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV Nikolaj Starodubčev, Poštrestante, SU-340047 Doneck
Sud-Afriko	Axel von Blottnitz – Marcolaan 8 – 1710 Florida Glen
Svedujo	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund
Svisujo	Jean Jacques Lavanchy, Traménaz 21, CH-1814 La Tour de Peilz
Venezuelo	Esteban E. Mosonyi, Apartado 61500, Chacao, Caracas.

IZOLITAJ MEMBROJ

Ĉeĥoslovakujo	Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřimezdice Okr. Píbram
Ĉinujo	Lu Chien-bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan
Germana D R	Till Dahlenburg, str. d. DSF 13, DDR-2722 Brüel
Irano	M. Saghafian, Siras ave., Emdadi st. 22, Vanak, Teheran 19
Jemena PDR	Jozefo Megyeri, Al-Gomhouriyeh Hospital, Khormaksar, Aden
Kubo	Pedro Pablo Lamas Díaz, Apartado 223, Ciego de Avila
Singapuro	Hongi Liao, apt. blk. 14, 2809 H, Eunus Crescent, Singapuro 14
Zairujo	Antoine-Samuel Ngangu, B P 13, Lukala, Nkandu

ESTRARO DE ILEI

prezidanto	rektoro Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, F. R. Germanujo
vicprezidanto	direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapeŝt X, Hungarujo
sekretario	d-ro prof. Mario Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa, Italujo
vicsekretario	prof. Francisko Zaragoza Ruíz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo
kasisto	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo

KUNLABORANTAJ ORGANIZOJ

FIMEM	Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda
UEA	Universala Esperanto-Asocio
Unesko	Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO – IPR

organo de

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – ILEI

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, kategorio C

aperas trifoje jare

redaktas – Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, FRG

poŝtĝirkonto – Stockholm 682-117-7 ILEI, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo

jarabono – 20 svedaj kronoj

la abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI

nemembroj de ILEI pagu al la supre indikita poŝtĝirkonto